

Groupe Espérantiste Périgourdin (GEP)

Cours d'espéranto, conférences, expositions...

17, rue Pierre Clostermann 24330 BASSILLAC Tél. : 05 53 54 49 71

<http://esperanto-gep.asso.fr>

esperantoperigord@yahoo.fr

Présidents d'honneur : Jacques GREGOIRE et Jacques RAVARY.

Président : Ange MATEO, 24330 Bassillac

06 88 74 94 78 angemateo@yahoo.fr

Vice-présidente : Martine DEMOUY, 114 bis, rue des Remparts, 24000 Périgueux.

05 53 09 69 82 martine.demouy@wanadoo.fr

Vice-président : Maurice JUY, Les Campagnolles, 24370 Calviac en Périgord.

05 53 59 60 27 monique.juy@wanadoo.fr

Vice-président : Claude LABETAA, 17, rue Pierre Clostermann, 24330 Bassillac.

05 53 54 49 71 labetaa.claude@wanadoo.fr

Secrétaire : François BARTSCH, Chauzaud, 24420 Savignac-les-Eglises.

05 53 04 55 36 info@bartsch.fr

Secrétaire adjointe : Sylvie JOUGLET, lieu dit Puy du Roc, 24420 Savignac-les-Eglises.

05 53 09 27 24 vi.jougllet@yahoo.fr

Trésorier : Max DEMOUY, 114 bis, rue des Remparts, 24000 Périgueux.

05 53 09 69 82 max.demouy@wanadoo.fr

Trésorière adjointe : Anne-Marie GALESNE, 96, rue Gambetta, 24000 Périgueux

06 47 33 96 07 anne-marie.galesne@orange.fr

Autres membres du CA : Alexia AUGRAS (déléguée auprès des jeunes), Michèle DELPEY, Christian DE WILDE et Sylviane LEROUX.

Relais locaux (des espérantistes près de chez vous) :

Bergeracois : Alain et Brigitte BROQUET, le Canton, 24520 Saint-Sauveur de Bergerac. 06 51 24 50 24 ab.24@free.fr

Mussidanais : Richard RIO, 25 rue Arzens, 24400 Mussidan.

05 53 82 69 71 r.rio@laposte.net

Périgueux et agglomération : Claude LABETAA (vice-président, coordonnées ci-dessus).

Sarladais et Périgord Noir : Maurice JUY (vice-président, coordonnées ci-dessus).

Informilo / Bulletin d'information

Rédaction collégiale. Mise en page Claude Labetaa. Envoyez vos documents, si possible en format numérique à labetaa.claude@wanadoo.fr, avant le :

1^{er} février pour le n° du printemps 1^{er} mai pour le n° de l'été


1^{er} août pour le n° de l'automne 1^{er} novembre pour le n° de l'hiver.

Cotisations 2020 (de sept 2019 à août 2020)

Sauf erreur de notre part, vous êtes dans la situation suivante : ☐ service gratuit

☐ adh 2019 ☐ sout 2019 ☐ adh 2020 ☐ sout 2020 ☐ veuillez régler :

Attention ! Nous proposons maintenant une adhésion commune Espéranto-France - Groupe Espérantiste Périgourdin ouvrant droit à déduction fiscale. Bulletin et précisions sur demande aux adresses ci-dessus ou auprès de nos animateurs.



ESPERANTO

Périgord

INFORMILO n-ro 116

Somero 2019

Le bulletin d'information du Groupe Espérantiste Périgourdin,
trimestriel en français et en espéranto.



Cet automne, l'espérantiste flamand Yves Nevelsteen, ici au lycée Bertran de Born, nous a dressé le portrait linguistique de la Belgique et a présenté ses nombreuses réalisations en faveur de l'espéranto.

- La knabino kaj la hundo kiu kapablas paroli page 4
- Avĉjo rakontas... du renkontiĝojn page 6
- Tajĝiĉuano kaj ĉigongo page 8
- Heraldiko page 9

kaj tiel plu...

EDITORIAL - FRONTARTIKOLO

L'Espéranto : témoin d'un XX^{ème} siècle tourmenté...

par Ange Mateo

Le 27 janvier 1945, les troupes soviétiques découvrent effarées le camp de concentration et d'extermination d'Auschwitz-Birkenau. Les médias ont récemment évoqué ce pan bien sombre de l'histoire de l'humanité à l'occasion du 75^{ème} "anniversaire" de cet événement.

On pense avec émotion à ces millions de personnes assassinées : juifs, homosexuels, tziganes, prisonniers politiques... Mais l'histoire n'en est que plus poignante si elle est incarnée par des êtres dont on suit avec effroi l'histoire personnelle.

C'est le cas du créateur de l'espéranto L.L. Zamenhof, disparu en 1917 accablé par les affres et les horreurs de la première guerre mondiale, et de sa famille qui subit les conséquences macabres de la seconde. En effet, le Dr Zamenhof eut trois enfants avec son épouse Klara qui a toujours soutenu son projet de langue internationale : Adam, Sophie et Lydia. Adam et Sophie devinrent médecins comme leur illustre père et la cadette Lydia diffusa et enseigna l'espéranto en voyageant en Europe et aux États-Unis.

Après l'invasion de la Pologne en septembre 1939, la Gestapo reçoit l'ordre de "s'occuper" de la famille Zamenhof qui est juive et, circonstance aggravante, espérantiste. Adam est tué dans un camp en 1940 et ses deux sœurs sont assassinées dans le camp d'extermination de Treblinka à l'automne 1942.

Même guerre, autre destin : celui de Simon Coencas, récemment disparu à l'âge de 93 ans. C'était le dernier survivant des quatre inventeurs de la grotte de Lascaux découverte en 1940. Cet adolescent dont les parents étaient juifs d'origine grecque établis à Paris, vivait alors à Montignac, qu'il quitta peu de temps après la découverte. Ses parents sont morts en déportation, à laquelle lui-même échappa de justesse en octobre 1942 grâce à l'intervention de la Croix-Rouge au camp de Drancy.

Le périgourdin Thierry Félix, co-auteur de la BD "Le secret des bois de Lascaux" (traduite et éditée en espéranto par notre association), avait à nouveau réuni les quatre "adolescents" en 1986 à Montignac.

Même si l'espéranto ne disparut pas pour autant suite aux deux conflits mondiaux, ces derniers portèrent un sérieux coup de frein au développement de cette langue emprunte d'un désir de paix, de partage et d'entente entre les peuples. Cette utopie concrète est restée bien vivante comme en témoignent les centaines de milliers de personnes de par le monde qui la font vivre encore aujourd'hui.

Correction de la grille du numéro précédent

1	A	2	K	3	A	4	D	5	E	6	M	7	I	8	O	9	T
10	P	11	O	12	R	13		14	I	15	E	16	N	17		18	R
19	E	20	M	21	B	22	A	23	R	24	A	25	S	26	I	27	T
28	R	29	E	30		31	O	32		33		34	E	35	N	36	
37	I	38	N	39	F	40	E	41	K	42	T	43	A	44	S	45	S
46		47	C	48		49	L	50		51		52		53		54	D
55	M	56	A	57	L	58	F	59	R	60	U	61	A	62	N	63	O
64	I	65	N	66	E	67		68	U	69		70		71	S	72	E
73		74	T	75	O	76	A	77	S	78		79	O	80		81	D
82	B	83	O	84	N	85	V	86	E	87	N	88	I	89	G	90	A
91		92		93		94		95		96		97		98		99	S

Bonvenon! = Bienvenu(e)(s) !

Bonvenigi = souhaiter la bienvenue.

Transdoni = transmettre.

Senso = sens (vue, ouïe...)

Senco = sens (signification)

Senco = sencumo = sens (ex. : vers la droite)

Arbo, leono, elfo, roko, senso, teo deviennent après élision du « o » final : arb', leon', elf', rok', sens', te'.

BALDAŬ... BIENTÔT...

Kvinpetalo (4 rue du Bureau, 86410 Bouresse)

Du 15 au 19 juin : Promenade dans la nature et Wikipedio (version en espéranto de Wikipedia) : Alain Favre vous proposera, selon le temps et les participants, un stage pour différents niveaux.

Renseignements et inscriptions : <http://kvinpetalo.org>

Le château de Grésillon (Saint-Martin d'Arcé, 49150 Baugé)

Du 17 au 25 avril : 10^{ème} PRINTEMPaS, cours pour niveaux A1-A2 (Marion Quenut), B1 (Christophe Chazarein), B2 (Szilva Szabolcs), C1 (Przemek Wierzbowski). Diverses animations par Nathalie Dubrulle-Rigault.

24 et 25 avril : les examens KER pour les niveaux B1, B2 et C1.

Du 30 avril au 4 mai : Interkant (choeurs) avec Zdravka Bojčeva et LandArt (art et nature) avec Nathalie Dubrulle.

Renseignements et inscriptions : <http://www.gresillon.org>

Le congrès universel à Montréal

Il se déroulera du 1^{er} au 8 août 2020.


Renseignements : <https://esperanto2020.ca/fr/accueil/>

Inscriptions sur le site de UEA, l'association mondiale d'espéranto :

<https://uea.org/kongresoj/alighilo>

KRUCVORTENIGMO

far Claude Labetaa



La grille ci-contre (kve_20) sera bientôt sur notre site internet qui comporte trois grilles pour débutants et d'autres grilles un peu plus difficiles, mais où l'aide en ligne peut être très utile. Adresse : <http://esperanto-gep.asso.fr> Voir à la page "jeux". Des jeux de pendu pour enfants et débutants y sont également présents.

Horizontale:

1. Gratuli ne sincere.
4. En loko malpli alta.
8. La unua kaj lasta literoj de "ridi".
9. Ne estas kontestebla.
10. Loĝej' en konstruaĵo.
13. Tiu ĉi estas kvinlitera kaj vi devas trovi ĝin.
14. Demanda vorteto.
15. Nekonata subjekto.
17. Tute ne konfirmas.
19. Vorteto por montri aŭ signali.
20. Mil metroj.
21. Invitus.
24. La kemia simbolo de bromo.
27. Post la sepa.
28. Moviĝu.
29. De tiu vir' vi estas la filo aŭ filino.
32. Iros al ni.
34. El tia loko vi ekflugos por vojaĝi.

Rappel : une apostrophe dans la définition indique l'élision du « o » final d'un substantif.

Vertikale:

1. Filoj de la samaj gepatroj.
2. Buŝrand'.
3. Konstruaĵo por vidi malproksimen.
4. Grajnon.
5. Substanc' eligita de la renoj.
6. Ili enhavas bankuvon kaj/aŭ duŝejon...
7. Ekzistus.
9. Unu' de povo.
11. Patrino de patro aŭ de patrino.
12. Transig' de iu lingvo al alia.
16. Fil' de frato aŭ fratino.
18. Vorteto esprimanta komencon.
22. Amika.
23. Liberigi de danĝero.
25. Li eble loĝas en Moskvo.
26. Kolektiva.
28. Kiel farus vian patrino, vian edzinon...
30. Patr' de patro aŭ de patrino.
31. La unua kaj lasta literoj de "teni".
33. Prepozicio indikanta movon eksteren.

INFORMOJ

Malfruo

Le retard dans la parution de notre trimestriel (environ 6 mois, soit 2 numéros) est décidément très difficile à rattraper. C'est pourquoi nous accueillons avec plaisir les nouvelles contributions en espéranto de Mireille et de Roland, qui confirment leurs talents créatifs, ainsi que la première contribution de Serge, venu de Toulouse avec Kim renforcer notre groupe périgourdin. Serge vous présente page 8 ses arts martiaux favoris.

Votre informilo renferme donc davantage de textes en espéranto cette fois-ci. Nos débutants pourront demander un peu d'aide à leur animateur-trice.

Kronviruso

A l'heure où nous écrivons ces lignes (5 mars 2020) et où nous ne savons pas encore à quelle échelle la pandémie touchera la population de notre pays, nous avons reçu des nouvelles rassurantes concernant la santé de nos amis espérantistes chinois, et nous espérons qu'elles se confirmeront dans les prochaines semaines.

Si vous échangez au sujet du COVID-19 en espéranto avec vos correspondants, vous vous êtes certainement demandé comment traduire 'coronavirus'. L'irruption dans l'actualité d'un mot employé sous plusieurs versions dans le milieu scientifique nécessitait une petite remise en ordre. Ce fut fait en moins de deux semaines à l'échelle internationale.

Rappelons d'abord que le mot latin *corona* évoque la couronne de protéines disposée autour des virus de cette nombreuse famille. *Krono* signifie couronne en espéranto, mais s'il s'agit de la couronne solaire, les scientifiques lui préfèrent le terme *korono*. Alors *koronaviruso*, *koron(o)viruso*, *kron(o)viruso*... ? Le 'o' entre parenthèses indique l'élision possible du 'o'. Après de rapides échanges de courriels, le mot *kronviruso* s'est imposé, semble-t-il suite aux articles de Ĉina Radio Internacia (version en espéranto de Radio Chine Internationale), particulièrement concernée, et de Monato, le mensuel à diffusion mondiale.

Ceci montre à quel point la communauté espérantiste est réactive par internet. Vous trouverez des échanges concernant des termes nouveaux ou ayant donné lieu à des discussions entre rédacteurs de Vikipedio (Wikipedia en espéranto) ces dernières années à l'adresse :

https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Alinomendaj_artikoloj

Pour nos amis non espérantophones, voici donc un bel exemple montrant que l'espéranto est une langue vivante, utilisée sur les cinq continents, qui évolue à la vitesse que lui permettent les moyens actuels de communication, et en particulier internet.

LA KNABINO KAJ LA HUNDO KIU KAPABLAS PAROLI

far Mireille Rousselle

- Panjo! Panjo! Okazis al mi io eksterordinara! Vi ne tuj kredos min: nia hundo Toby povas paroli! Li parolas kiel ni, per vortoj! Tio estas vera: li tiel alparolis min, kiel mi alparolas vin nun... Kaj ambaŭ ni travivis nekredeblan aventuron!

- Kvietiĝu, mia filino, mi petas: parolu pli malrapide! Vi diras al mi, ke Toby parolas? Sed Toby estas hundo, kaj la hundoj ne povas paroli kiel la homoj!

- Jes ja! Mi certigas, ke ni interŝanĝis parolojn, kaj ni interkompreniĝis. Aŭskultu min: mi tuj rakontos ĉion al vi... Ni ambaŭ ekiris en la ĝardenon post la tagmanĝo; ni promenis en la aleoj: mi lin sekvis; kaj li haltis apud la puto; mi sidiĝis en la ombro de la visterio. Tiam Toby kuŝiĝis piede de mi, kaj li metis sian kapon sur miajn genuojn. Mi karesis lin dolĉe. Ni sentis nin komforte tiele... Sed subite li rigardis min en miaj okuloj... kaj li komencis paroli al mi! Li diris: "Vi estas afabla mastrineto: mi amas vin multe. Ne miru, ke mi parolas: ĉiuj bestoj povus paroli, se ili volus. Kaj mi volas paroli kun vi, ĉar vi al mi estas kvazaŭ amikino". Sed mi ne povis respondi; kaj li daŭrigis: "Ĉu vi scias, ke en tiu puto estas mondo fantasta? Se vi volas, ni povas malsupreniri en la puto, kaj malkovri la popolon de la koboldoj, kiu loĝas sub la tero". Mi estis scivola, nu mi diris al li: "Jes, mi volas vidi la popolon de la koboldoj kun vi!"... Kaj tial ni superpaŝis la putorandon: estis ŝtupareto en la puto; kaj ni malsupreniris singarde la ŝtupetojn, longe, longe... Sed en la fundo, ne estis mallumo: ni estis en arbarego plena de multkoloraj floroj kaj fungoj! Koboldetoj venis de ĉiuj flankoj al ni: ili havis komikajn pintajn ĉapojn, kaj ili estis ridetantaj... Toby klarigis, kiuj ni estis, kaj de kie ni venis. Kaj li diris al ili, ke ni volis koni ilin. Tial ili montris al ni sian vilaĝeton kaj siajn dometojn; sed ni ne povis eniri, ĉar tiuj estis tro malgrandaj por ni! Poste ni manĝetis iom da ilia nutraĵo: iliaj kuketoj estis tre sukeraj kaj bongustegaj!...

- Via historio estas belega, mia karega filino, sed mi kredas, ke vi endormiĝis sub la visterio, kaj ke vi sonĝis: tio, kion vi rakontis al mi estis nur sonĝo, belega sonĝo!

- Ne! Panjo! Ne estis sonĝo: mi vere malsupreniris en la puton! Mi tien malsupreniris kun Toby! Cetere, li tuj diros al vi, ke tio estas vera! Toby, diru al Panjo, ke ni vere ambaŭ malsupreniris en la puton, kaj ke ni vidis la koboldojn en la fundo! Parolu al ŝi, Toby!...

- Toby estas tre inteligenta, kaj li komprenas multajn aferojn; sed li ne estas kapabla paroli! Li svingetas sian voston, ĉar li vidas, ke ni parolas pri li. Sed la hundoj nur povas boji...

atakanton kaj eĉ, ekzemple, faligi lin. Necesas nek violentaj agoj nek batoj. Estas malfacile traduki TAJĜIĈUANO-n al okcidentaj lingvoj kaj ankaŭ al Esperanto. Ofte ĝi estas tradukita kiel « plejsupra batalarto ». Estas tre malfacile kaj tre longe iĝi spertulo.

Fakte la plejparto el la praktikantoj ne konsideras TAJĜIĈUANO-n, kiel sindefendan arton. Ili praktikas ĝin kiel amuzan, sendanĝeran sporton, kiu bonigas kaj fortigas la korpon kaj la menson. Krome, tiu arto povas esti praktikata de personoj kun iu ajn aĝo, viroj kaj virinoj.

HERALDIKO

far Roland Tierce

La heraldiko aperis en la 12a jarcento... Ĉiuj povis havi blazonon, eĉ la kamparanoj, la korporacioj, la burĝoj kaj la nobeloj. Nun, ĉiu povas krei sian blazonon. Sed oni ne prenu la blazonon de alia persono.

Por fari blazonon, oni devas respekti heraldikajn regulojn. Ekzemple: blazono povas konsisti el diversaj partoj: horizontala, vertikala, dekstre aŭ maldekstre oblikva aŭ ĉiuj tiuj partoj samtempe (nome ĝirono). En blazonistiko, oni nomas la kolorojn malsame ol en la franca. Ekzemple:

la ruĝa koloro iĝas: gorĝo (*gueules*)

la verda koloro iĝas: sinoplo (*sinople*)

la blua koloro iĝas: lazuro (*azur*)

la nigra koloro iĝas: sablo (*sable*)

Krome ora kaj arĝenta koloroj:

oro kaj arĝento.

Blazoni signifas parole priskribi blazonon. Ekzemple: « Lazura kun tri oraj lilioj » signifas « *d'azur à 3 fleurs de lis d'or.* » (vidu la ĉi-supran bildon)

Al kiu apartenas tiu blazono? Ĝi estas la blazono de la franca reĝlando depost la reĝo Karlo la kvina en la jaro 1376.



Solutions du numéro précédent

Anagramoj: afikso - fiasko ; agrable - algebra ; alergio - galerio
akronimo - monarkio ; malespero - explorema

Proverboj: Kia estas via laboro, tia estas via valoro. Kia la semo, tia la rikolto.
Kia reganto, tia servanto. Kia greno, tia pano. Kia pago, tia ago.
Kia sufloro, tia aktoro. Kia fripono, tia bastono.

TAJĜÎĈUANO kaj ĈIGONGO

far Serge Leroy

Por iu kiu konas nenion pri ĉi tiuj du praktikadoj, oni povas diri ke ĈIGONGO estas kvazaŭa gimastiko kaj TAJĜÎĈUANO iu speciala luktarto. Antaŭ priskribi ilin oni devas scii plurajn bazajn informojn.

Unue, ambaŭ devenas el Ĉinio. Ili estas bazitaj sur la ĉina sperto de la homa korpo kaj ties funkciado. Mi volas paroli pri la meridianoj, pri la akupunkturaj punktoj, kaj finfine la plej grava afero: la interna energio nomita *QI* (ĉi tie franclingve skribita, sed prononcu: *ĈI*).

La fonto de tiu interna energio estas punkto situanta ene de la ventro, du fingrojn sub la umbiliko kaj du fingrojn antaŭ la vertebra kolumno. Tiu punkto estas tre konata de ĉiuj luktosportaj praktikantoj. Ĝi nomiĝas *TANTIEN* en la ĉina lingvo kaj *HARA* en la japana (pensu pri *HARA KIRI*).

La origino de ĉi tiuj du kvazaŭaj sportoj estas tre malnova kaj ne tre bone konata. Estas pluraj legendoj pri tio. Iu fame konata rakontas ke iam, antaŭlonge, iu ĉina monaĥo spektis batalon inter birdo kaj serpento. Li observis la gestojn de ĉi tiuj du bestoj kaj pensis, ke tiajn gestojn homoj povos uzi por sin defendi kontraŭ atakanto. La legendo ne diras, kiu gajnis la batalon inter la birdo kaj la serpento!

Nun, mi priskribu ĈIGONGO. ĈIGONGO konsistas el granda nombro da korpaj ekzercoj, tial oni povas kompari ĝin kun gimnastiko. La diferenco estas, ke la ĈIGONGO-ekzercoj estas farataj malrapide, tre precize, kun granda konscio de la efektivigataj gestoj. La celo de tiu kvazaŭa gimnastiko, estas pliiĝi la internan energion kaj cirkuligi ĝin en la tuta korpo. Fakte ĈIGONGO signifas en la ĉina lingvo « laboro pri interna energio ».

Pri ĈIGONGO oni rakontas historion, kiu verŝajne ne estas legendo. Iam, antaŭlonge, iu generalo ordonis, ke la morgaŭon la soldatoj faru serion da ok ekzercoj konataj ankoraŭ hodiaŭ, kiel la ok pecoj de iu brokaĵo. Ekzistas pluraj aliaj serioj de ĈIGONGO-ekzercoj, exemple, ĈIGONGO de la kvin bestoj, de la kvin elementoj, de la kvar sezonoj, ktp... Se vi interesiĝas pri tio, serĉu sur la reto. Nur tajpu ĈIGONGO kaj vi trovos multe da referencoj.

Nun, kio estas TAJĜÎĈUANO? Unuavide oni povas diri ke ĝi ŝajnas ĈIGONGO, ĉar la agoj estas malrapidaj. Sed la celo estas tute malsama. TAJĜÎĈUANO konsistas el sinsekvo da precizaj agoj, moviĝoj, delokiĝoj kiuj ŝajnigas batalajn fazojn. Kiam iu praktikanto konas bone iun, li eksperimentas ĝin kun alia praktikanto, kiu simulas atakon. Pro la granda konscio de la situacio, per malgranda kaj preciza ago akompanata de interna energio, oni povas eviti la

- Aĥ! Mi komprenas, kial li ne volas paroli nun! La bestoj ne volas paroli antaŭ la plenkreskuloj! Ili parolas nur al la infanoj kiel mi!... Ne estas grave, Tobby! Ni ambaŭ scias la veron; estas domaĝe, ke la plenkreskuloj ne ĝin konas! La plenkreskuloj neniam devus grandiĝi!!! ».

Jen kelkaj fotoj el nia lasta tradicia platkukfestoj en Trélissac

Voici quelques photos de notre dernière galette traditionnelle à Trélissac



AVĈJO RAKONTAS... DU RENKONTIĜOJN

far Claude Labetaa

- Avĉjo! Avĉjo! Mi ne povas endormiĝi. Rakontu al mi historion, mi petas.
- Jes, konsentite, sed poste, vi ekdormu, Jade.
- Jes, kompreneble, Avĉjo.
- Bone, enlitiĝu kaj mi tuj komencos.

EN FERIKOLONIO

Kiam mi estis juna instruisto, mi pasigis kelkajn feriojn laborante en ferikolonioj.

Tiun jaron mi laboris unuafoje en printempo, kiel grupogvidanto en kolonio, kies direktoro estas bona amiko. Tiu proponis, ke mi denove kunlaboru kun li en somero, sed ĉi-foje kiel vicdirektoro.

En julio de tiu jaro mi do troviĝis en bela mezmontara regiono de suda Francio kaj mia nova funkcio igis min konatiĝi ne nur kun la infanoj, sed ankaŭ kun ĉiuj gvidantoj, kaj ĉiuj ceteraj profesiuloj de la kolonio. La infanoj, fakte antaŭadoleskantoj, la respondeculoj kaj la gvidantoj devenis el la pariza suburbo, kiam la kontisto kaj la laboristoj pri kuirado aŭ mastrumado de la diversaj ĉambroj estis plejparte lokaj. Ĉu la malfacileco regi la petolaĵojn de la gejunuloj - kelkajn el ili eĉ relative gravajn - helpis al la solidariĝo de ĉiuj plenkreskuloj? Verŝajne pro tio la etoso estis bonega.

Iun tagon, juna laboristino invitis ĉiujn plenkreskulojn, por festi sian baldaŭan naskiĝdatrevenon: la dek-unuan de julio. Kelkajn tagojn antaŭ tiu dato, kiam ŝi invitis min, mi tuj diris: « Ankaŭ mi naskiĝis tiun tagon! La dek-unua de julio estas ankaŭ mia datreveno! ». La belulino respondis: « Ho! Nekredeble! Ĉu vi vere volas, ke mi kredis tion? Ĉu ne estas rimedo por allogi min? ». Mi respondis: « Tute ne! Mi scias, ke la ŝanco naskiĝi la saman tagon estas malalta (precize unu ŝanco el tricent sesdek kvin), sed estas fakto ». Kaj antaŭ ŝia nekredemo mi eliris el mia poŝto mian identigilon, kiun mi tuj montris al ŝi. « Rigardu! Mi ne mensogis, eĉ se bedaŭrinde mi naskiĝis kelkajn jarojn antaŭ vi ».

Ni do festis kune nian datrevenon, kaj post kelke da tempo ni decidis festi kune ĉiujn sekvajn. Tiel mi renkontiĝis kun via avino, karulino.

- Ŝajnas, ke ŝi nun dormas... Mi povos kisi ŝin sur la frunto kaj lasi ŝin dormi...
- Avĉjo! Avĉjo! Mi ankoraŭ ne dormas. Via historio estis tro mallonga. Mi bezonas duan.

- Ho, Jade, ĉiujespere ni travivas la samon... Nu, bone. Mi rakontas duan, sed estos la lasta. Poste, vi dormu.

- Jes, Avĉjo, mi promesas.

- Bone. Jen la dua historio. La unua estis nia vera historio. Sed tiu nova estos tute imaga.

EN PARIZA METROO

Kiam Marko estis studento, li ĉiutage uzis la metroon por iri al la universato. Metroo estas subtera fervojo, subgrunda trajno se vi preferas.

Tiam la trajnoj malkomforte kaj brue veturigis la uzantojn sed tamen la etoso estis familiara kaj relative agrabla malgraŭ la kutima neparolemo de la parizanoj. Nur la akceptistoj - tiuj prikantitaj de Serge Gainsbourg - kies tasko estis « trui » la biletojn por ilin validigi, ofte diris kelkajn vortojn por okupi sian verŝajnan enuon.

Inter la stacioj la tuneloj dismontris la samajn reklamojn: « Bona, bela, Bonabelo... » (*) aŭ similaj celis okupi niajn pensojn. La metrooj estis nur moviĝaj pripensejoj aŭ legadejoj en kiuj la ŝanco renkonti konatulon estis tre malalta.

Iumatene, dum halto en stacio, kiam ankaŭ la alisenca trajno ĵus haltis, Marko rimarkis en la alia trajno junulon, kiu geste alvokis lin. Pro la vitroj de la du vagonoj kaj la ĉirkaŭa bruo ili ne povis interŝanĝi parole, sed Marko okulesprime demandis la alian kaj divenis lian intencon. Li deziris alparoli apud Marko sidantan junulinon, kiun ŝia libro tute absorbis.

Antaŭ la tuja forveturo de ambaŭ trajnoj, Marko eliris ŝin el ŝia legado, kiu verŝajne estis interesege laŭ la tempo, kiun ŝi bezonis por levi siajn okulojn al li. Belegaj estis la okuloj, mi precizigu. Li tuj montris al ŝi la junulon, kiu ĵus gestis al li. Sed tiu, neatendite, estis trankvile leganta sian ĵurnalon! Kaj liaj apuduloj malfacile kaŝis siajn ridetojn aŭ eĉ ridojn! Kaj tuj poste ambaŭ trajnoj ekveturis disiĝante.

Marko evidente komprenis la ŝercon, sed tro malfrue. La junulino rigardis lin duonmire, duonmoke. Ĉar lia mieno certe estis ridinda. Ankaŭ ŝi komprenis la ŝercon kaj, forlasante sian libron, ekkonversaciis kun Marko... Marko kore dankas tiun nekonatan ŝercemulon, ĉar li kaj lia nova amikino neniam ĉesigis tiun konversacion!

- Ha, finfine ŝi profunde dormas. Mi nun povas senbrue eliri el ŝia dormoĉambro...

(*) Fakte, temis pri « Du beau, du bon, Dubonnet »